Theodor Storm,

Oktobra lido

tradukita de Richard Schulz

Folioj falas en nebul'.
Ni vinon nun gustumu!
La grizan tagon kune ni
Orumu, ja orumu!

Kaj turbulentas la veter'
Kristane aŭ pagane,
La Tero estas ja la Ter':
La vento bruas vane.

Kaj plendas iam ajn la kor', -
Tintigu ni la glasojn!
Ni scias ja, bravega kor'
Ne timas embarasojn.

Folioj falas en nebul'.
Ni vinon nun gustumu!
La grizan tagon kune ni
Orumu, ja orumu!

Aŭtunas, sed atendu nur,
Atendu iomete!
Printemp', violoj kaj ĉiel'
Ridados ĉiuj vete.

Ebriaj tagoj ekas nun.
Ne volas ni enui.
Ni volas ilin, kara ul',
Elĝui, ja elĝui.

Traduko de la Germana poemo "Oktoberlied" de THEODOR STORM *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de* RICHARD SCHULZ *(Rikardo Ŝulco, ∗1906-07-12 – †1997-09-26).*

Arg-174-352 (2013-02-26 15:14:48)

La traduko estas - kun permeso de la eldoninto, sinjoro Hermann Behrmann, prenita el la libro "La muzino" de Rikardp Ŝulco (Richard Schulz), eldonita de la Esperanto-Centro Paderborn', Germanujo, en 1992. Ĝi troviĝas ankaŭ en la numero 6/1984 de la GEA-organo "Esperanto aktuell". Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon `http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`.